# *Rimarkinde malaltaj maksimumaj temperaturoj en la kuba okcidento*



Havano, dec 26 (RHK) La plej malvarma tago de la nuna vintra sezono, kaj unu el la plej malvarmaj por Kubo en monato decembro en pluraj jaroj, estis registrita ?i-diman?e, la 25-an, kiam rimarkinde malaltaj maksimumaj temperaturoj okazis en malsamaj lokoj de la okcidenta regiono.

Kiel raportite de la Scienca Majstro Evelio García Valdés, ?efa specialisto de la Prognoza Centro de la Instituto pri Meteologio, la plej signifa okazis en la urbo Bainoa, okcidenta provinco Mayabeque, kiu raportis 15,4 C gradojn, ?irka? la unua horo posttagmeze, poste 16.0 en najbara regiono Güines.

Kiel indikis García Valdés, en la stacio Casablanca en la ?efurbo, la termometro markis tiam 17,5 C gradojn, sed je la kvara posttagmeze la temperaturo falis al 15,3, rekordo kiu, kunigita kun la efiko de konstanta vento de norda komponanto, pli alta ol 20 kilometroj hore, ka?zis, ke la malvarmo sentata de

homoj estu proksimume kvar a? kvin gradoj, sub la menciita valoro.

Por hodia?, lundo, la markitaj vintraj kondi?oj estos konservitaj en la okcidento, kun maksimumaj temperaturoj en la ordo de 17 ?is 20 celsiusgradoj.

Tio ?uldi?as al la influo de tre malvarma aermaso de arkta origino super tiu parto de la kuba insularo.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/ciencias/308910-rimarkinde-malaltaj-maksimumaj-temperaturoj-en-la-kuba-okcidento

**Radio Habana Cuba**